Joseph Freiherr von Eichendorff,

# En la nokto

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

La viv' ekstere nun silentas,
Ne estas lum-radi',
Tim-tremon mia koro sentas,
Ennokten aŭdas mi.

Nun, kiam disfluinta estas
De l' tag' malharmoni',
Ho, kio kiel gajno restas
Nun, laca hom', al vi?

La lun' konsole jen trankvilas
Post malleviĝ' de l' mond',
La sanktaj steloj sole brilas
Sur la ĉiela rond'!

Vagante sur malhela maro
Veturas mi, Sinjor'.
Min gvidas Via or-stelaro
Ĝis de l' etern' aŭror'.

*Traduko de la Germana poemo "In der Nacht" de* Joseph Freiherr von Eichendorff *(∗1788-03-10 – †1857-11-26) en Esperanton de* Manfredo Ratislavo *(Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, ∗1938-11-04) en 1989-04.*

*MR-221-1 / Arg-226-446 (2004-04-23 09:44:54)*